


Ovra Burgôno
—Invit' al ne Ĉinesko,
sed nur laŭ Ĉinesko



Verkita de Sceto

Eldonejo Satano

2009 Ĉinio

Ovra burĝono

Ĉineskigis Sceto

Eldonejo Satano

2009

Serio Ĉinesko n-ro 1

Respondeca redaktoro: Guozhu

Ovra Burĝano

Aŭtoro: Sceto

Eldonanto: Lin Liyuan

2009-08

Enhavo de La Oвра Burĝono

Enhavo

Enkonduka novelo

§01. Post muslin'

§02. Ĉe balustrad'

§03. Printempe

§04. Tepidas

§05. Longas la tag'

§06. Troigo

§07. Dumnokta

§08. Printemp-improvizo

§09. Ĉe herboj

§10. Solec'

§11. La hirundpara

§12. Zefiro

§13. Jadfluto

§14. Post ban'

§15. Strebo

§16. Amor-elano

§17. Enrob'leĝera

§18. Zefir'

§19. Jadtigo

§20. Pas' de nokt' volupta

§21. Ŝlosilo de Ĉinesko



Enkonduka novelo

La Resurekto

Dum la 71-a Universala Kongreso en 1986, mi konatiĝis kun s-ano Moritaka Osioka, la tiama ĝenerala sekretario de Japana Esperanto-Instituto, sed ne ĉe la kongresejo de Pekino, nur en la norda urbo Harbino. Post la Kongreso li kaj lia familio (bela kaj vigla edzino, paro da gefiloj) kun aliaj kongresanoj vizitis Harbinon laŭ itinero aranĝita de LKK.

La ĉarman Insulon Suno pluveto vualis. La gastoj esperantistaj kunvenis en salono de sanatorio tagmeze. Laŭkutime de tia kunveno mi, kiel vicprezidanto de la provinca Esp-Asocio, parolis pri “bonvenon” kaj “ĝojan vojaĝon” k.s.. Dum mia kompano s-ano Yang, la prezidanto de Harbina Esp-Asocio parolis, mi eĉ sentis min somnola, ĝuste tiam min spronis manklakado, varma kaj ĝentila, ke la “malferma rito” finiĝis. S-anoj, la gastoj kaj la gastigantoj, ekkantis kaj dancis amike kaj senbride.

Mi ne scipovas danci, nur sidis post tablo (la podia), eĉ ŝajnis, ke mi deziris siesti, tamen mi ne volis fari min arogantulo antaŭ niaj estimataj samideanoj, “noblaj gastoj”, laŭ kutima esprimo en la ĉina Esp-movado, do, mi devigis min rondigi la okulojn kaj kun rideto rigardis la dancejon.

Subite, antaŭ min iu fortiketa japana samideano alpaŝis kun ĝentila aŭ seriozeta mieno.

“Kiam vi komencis lerni Esperanton?”

Mi estis konsternita de lia subita ĉuo, kaj en la gorĝo...

“Ĉu antaŭ la milito ?” li plu.

“Kia milito ? Ĉu la dua mondmilito ?” mi ripetis la demandon.

Li nur kapjesis.

“Ne. Mi naskiĝis en 1939, mi nur eklernis la lingvon en 1957...”
mi respondis.

“Oh, ankaŭ mi naskiĝis en 1939.” Li eĥis min.

“Sed vi aspektis multe pli juna ol mi.” Mi haste diris, rimarkinte lian brilantan mienon kaj gagatnigran hararon, inter kiu troviĝis eĉ neniuj griza haroj.

“Nu...” li kapjesis, iomete kun fiero kaj memfido.

Poste ni ekinterparolis pri la movadoj de ambaŭ landoj, tia temo tuj forpelis mian somnolon, ĝis lia edzino leĝere ŝvebis antaŭ nian tablon. “Bonvolu foti nin.” li petis la edzinon kun tenere mangesto.

La foto poste aperis sur la Revuo Orienta, en kia n-ro ? nun mi jam ne klare memoras. Antaŭ ol li kun lia edzino eniris dancejon, li donis al mi sian nomkarton, kiun mi enpoŝigis.

Vespere, reveninte hotelon Beiyuan apud stacidomo, mi sentis min laca, tial ke mi post vespermaĝo tuj paŝis al lito, kaj elprenante de la poŝo la nomkarton, intencis meti ĝin sur la tableto ĉe la lito.

Subite, lia titolo kaptis mian atenton : la ĝenerala sekretario de JEI.

Ho, mi delonge deziris pli multe koni pri la japana movado, kaj informiĝi pri la beletra ĝemelstela paro Du Masaoj, Miyamoto kaj Ueyama, kial dum ni babilis, mi ne pli detale demandis al li pri tio? mi bedaŭre ve-spiris.

Sekvantan tagon la gastoj turisme vizitis la Infanan Parkon, Songhua-Galerion k.a.. ĝis la vespero la gastigantoj aranĝis balon en la Junulara Palaco, tiam mi trovis tiun Ĝeneralan Sekretarian Moŝton Osioka kaj kun li ŝultre-apud-ŝultre sidis apud la muro. Gajaj junulinoj

kaj junuloj de Harbino invitis gastojn danci. Sinjorino Osioka ankaŭ eniris kun iu ĉina samideano la dancejon. Tiam mi babilis kun s-ano Osioka pri la konsista maniero, konsilio, komitato kaj ties funkcioj de JEI k.a., li afable kaj detale klarigis al mi, eĉ por mia pli bona kompreno li sur mia notlibreto skribis kaj desegnis la tutajn du paĝojn.

“Ĉu vi fumas ?” Osioka ĵetis demandan rigardon al mi.

“Jes.” Mi tuj eĥis lin. “Nu, ni iru ekster la salonon por fumi !” mi proponis.

Ĉe la pordo ni prenis respektive cigaredojn, lia marko, Marbolo; la mia, Hongta. Tiam laŭ mia peto li diris al mi, ke Miyamoto ellaboris la Vortaron Japano-Esperantan por ties 2-a eldono, kaj Ueyama malsaniĝas... Eĉ li ne forgesis instigi min :“ Miyamoto rimarkis vian poezian laboron, ĉu via plano ? ”

Mi ankaŭ ŝvebunte memkontentis kaj murmuris :“ Mi versas originale poke, ĝis nun mi ĉefe elĉinigis poemojn de Tang-dinastio, ekz. tiujn de Li Bai, Li He, Li Shangyin... kaj intencas zorgi pri versado laŭ ĉinesko. Nun en nia landa movado ankoraŭ ne troviĝas beletra revuo, nur dank' al Hayasi Ken niaj verkoj povas aperi en la **Preludo...**”

“Hayasi Ken estas mia amiko.” Li fiere aldonis.

Post monatoj, li sendis al mi libropakaĵon, Kun ekstazo mi ovrís la pakaĵon, en kiu trovis libron kun kromkovrilo de la japana lingvo. Foliumente tiun, mi ekzaltiĝis de la propra kovrilo, jen la fama **Libro de Amo !**

Mi eklegis spit' al *la avertoj de l' aŭtoroj*, tiuj Penetr aŭ Penetrída! Ĉar mi jam scias pri la **Sekretaj Sonetoj**, leginte novelaron **Mi Amas...** de Ueyama Masao, delonge mi aspiris posedi tiun volumon. Ho, ja, kison al vi, Osioka !

Jam estis aŭgusto de 1989.

Laŭ invito de s-ano Osioka mi havis feliĉon viziti lian landon Japanio. Antaŭ mia ekveturo mi petis lin aranĝi rendevuon kun s-ro Miyamoto Masao, ĉar alia Masao, s-ano Ueyama jam forpasis. Tiam Osioka jam ekŝiĝis de JEI, kaj li akceptis min en sia urbo Hiroshima, la atombombita. En lia hejmo mi loĝis kelkajn noktojn kaj babilis sufiĉe multon. Li diris al mi, ke Miyamoto ankaŭ forpasis en majo, sed li aranĝis ke mi ĉeestos la memoran kunvenon por Miyamoto.

Dum la babilado mi menciis kun danko, ke li sendis al mi la raran **Libro de Amo**, kaj temis pri lia ruzeta artifikaĵo per la kromkovrilo de la japana. Li mokete diris, ridetante :“ Mi timis, ke via doganejo konfiskus la libron...” Mi laŭdis lian saĝecon kaj “Tamen, se en tiu libro troviĝus ilustraĵoj, do, la doganejo certe konfiskus ĝin. Sed ili aŭ ne scipovas Esperanton, aŭ ne havas tempon por tralegi, tiel mi bonorde ricevis la libron.”

“Ĉu pri tiaj ilustraĵoj ? Ŝajnas al mi, ke mi iam vidis en iu libro plurajn bildojn, similajn al priskribo de **Libro de Amo**, tiuj ja estas origine el antikva ĉina volumo...”

“Ĉu vere ? Kia libro kaj kiu estas la aŭtoro ?” mi urĝis la ĉuon.

“Ŝajnas al mi, ke la aŭtoro estas holandano, kiu funkciis en Japanio, ŝajne, li edzinigis ĉininon por si mem...Kia estas lia nomo ?” li pensis kuntirante brovojn.

“Jen, li nomiĝas Robert H. van Gulik !” lia mieno brilis.

“Robert H. van Gulik ? mi neniam aŭskultis...” mi grumbliis.

“Nu, kiam vi vizitos Tokion, pri tio vi povos pridemandi al s-ano Hayasi Ken, kiu multe legis.” Osioka donis al mi konsolon.

Post tagoj mi alvenis en Tokion. Hayasi-san fariĝis mia varma gastiganto, kaj mi loĝis en lia hejmo, kiu ĉiam plenis de akorda kaj miela etoso, lia ĉarma edzino estas pentristino.

Iuvespere, post vespermanĝo li prenis tason da viskion por si

mem, kaj laŭ mia plaĉo, al mi tason da biero, li kun mi babilis pri lia verkado de novelo, kiam lia novelo **Pupo kaj Lupo** aperis en la **Revuo Orienta**, tamen ne aperis la postaj ĉapitroj, kial ? mi demandis al Hayasi. Li diris, ke iuj opinias, ke la enhavo de la novelo estas tro frivola por tia serioza organo de Instituto, li mem eldonos libroforme baldaŭ... “Frivola ?...” mi suspektis.

“Eble iomete erotika...” li ridetis.

Subite, mi memoris pri la libro de tiu holandano Robert H. van Gulik, kaj demandis al Hayasi, ĉu li legis aŭ ne ? Konsiderinte, li diris :“Mi certe legis tiun verkon. Mi opinias, ke tia verko ja estas rara kun scienca valoro. Nu, tiuj ilustraĵoj...eble pli valoraj... rara kultura objekto. Nur, laŭ mia informo, Gulik mem nur presis 50 ekzemplerojn, kiujn li donacis al bibliotekoj de universitatoj en diversaj landoj, oni tre malfacile serĉas ĝin...”

“Ho ve...” mi elgorĝe ĝemtis.

Dum duonmonato mi haste tra Japanio vizitis plurajn urbojn, intime interparolis kun aktivuloj aŭ aktivulinoj en la loka Esp-movado, kaj en la fino de aŭgusto mi loĝis en la verdan hejmon de ges-anoj Takeuti, en kiu la lingvo Esperanto estas la ĉiutaga, kaj mi fariĝis favorata gasto de la mastrino, s-ino Tomika Takeuti. Ŝi akompanis min ĉeesti la memoran kunvenon por Miyamoto Masao en Osaka. Tie mi, kiel la leganto de Miyamoto, gasto el la Popola Ĉinio, parolis antaŭ la foto de Miyamoto (sed ne antaŭ li propra, ho ve...) esprimante mian dankon al lia valoraj verkado kaj tradukado en Esperanto, kiuj transfuzis al la esperanta kulturo la freŝan sangon el la orienta. Desur la podio paŝinte, mi rimarkis rideton al mi de Hayasi Ken, kiu speciale de Tokio veturis al Osaka por ĉeesti la kunvenon. Mi sidiĝis apud li, kaj prenis tason da biero el lia mano.

Post la kunveno Hayasi demandis min :“ Ĉu vi portos multon,

revenonte landen ?” “Ne.” mi respondis, “Nur unu kofron.”

“Do, portu ĉi tiun hejmen.” li donis al mi sakon, kiun mi ovrís kaj vidis la tutan kolekton de La Nica Literatura Revuo, entute 42 numeroj ! Kiam mi gastis en lia hejmo, mi foliumis ameme tiujn numerojn kun granda intereso, tiam Hayasi jam proponis al mi, ke mi kunportu ilin. Tamen mi sciis, tia kolekto eĉ en Japanio ja estas malmulta kaj kara por li mem, tial mi rifuzis lian donacon. Sed Hayasi kunportis la kolekton ĝis Osaka por refoje donaci al mi, kortuŝate, mi akceptis kun danko.

Sed, li ridetante, diris plu: “Iu samideano en Tokio, kiun mi petis por vi prunti la verkon de Robert H. van Gulik, kvankam ne sukcesis trovi la verkon de Gulik, tamen li bonkore petis min transdoni iujn manuskriptojn al vi.”

“Kiaj manuskriptoj?” kun skrupulo mi murmuris, “Antaŭ monatoj en nia ĉefurbo okazis la 4a de Junio-Tumulto, kvankam nur studenta movado, tamen la registaro intensigis cenzuron de doganejo, se temas pri la politika...”

“Ne pri politika, sed nur erotika !” Hayasi urĝis la klarigon.

“Pri erotika?” mia scivolemo igis min ovri la koverton, en kiu li metis manuskripton.

Jen ciklo da 20 poemoj. La titolo estas **Ovra Burĝono**, kaj sube, alititole: *Invit' ne al ĉinesko, sed nur laŭ ĉinesko...* Mi tuj memoris pri la poemaro de Miyamoto, **Invit' al Japanesko**, kiu grande influis al miaj kolegoj Guozhu kaj Lu Jixin, kaj ili ankaŭ lanĉis versadon laŭ ĉinesko, eĉ Lu jam elvokis: **Invit' al ĉinesko...** Foliumante haste la manuskriptojn, mi kun hela rideto al s-ano Hayasi: “Koran dankon! Tiuj ja estas tre raraj !” sed mia scivolemo pliiis : “De kie vi akiris tiujn ?”

“La aŭtoro mem ne deziras malkovri sian nomon... sed, li ja estas

ĉina samideano, kiu loĝas en Tokio, kaj... ” li ruzeme tiris la rideton el la buŝangulo, “nenio alia informiĝas.” Li diplomate dumane gestis.

Mi nur scivole kaj kun iometo da bedaŭro metis la koverton en la fundo de mia kofro.

Reveninte hejmen, mi tralegis la poemojn de tiu anonima ĉina aŭtoro, kiu nun loĝas en Tokio, kaj trovis ke li laŭ melodioj de la ĉina klasika fiksforma poezio versis, la stilo tute estas ĉineska kaj la enhavo – jen, priskribo de la seksa vivo de antikvaj ĉinoj, nu, alispeca **Libro de Amo...**

Mi ne publikigis tiujn poemojn en **Penseo** nek vidigis ilin al aliaj, ĉar ankaŭ mi sentis min perpleksa aŭ ... hontema.

Jam estis novembro de 1994. Kiam mi estis en urbo Kantono kaj kunloĝis kun Guozhu en sama ĉambro. Nokte, ni ofte ĝuis liberan babilon pri nia komuna ŝatata ĉevalido – la ĉina kaj Esperanta poezioj. Foje, kun bedaŭro Guozhu diris, ke li opiniis la ĉinajn pecojn en *la Sekreta Antologio* tradukitaj de G.P.Peneter ne sufiĉe tipa. Tio vundis lian patriotismon kvazaŭ manko de inda ĉina teamo en olimpikoj, sed, li veis, dirante, ke li dubas, ĉu efektive mankis al la ĉina antikva poezio la genro am(or)-poemoj en ia vera senco? Ĉar la versoj pri amora temo ĉinaj antikvuloj ankaŭ verkis tre pure, sankte kaj eŭfemisme. Mi suspekto rigardis al liaj okuloj, en kiuj mi legis nenan serĉemon, tiel mi malkaŝis al li la epizodon de mia vizito en Osaka.

“ Kial vi ne pli frue informis pri tio min ?” Li okulrondiĝis.

“Ĉar mi timis, ke la erotika enhavo iritis iujn, kiuj eble kalumnias min perversa...”

“ Fi, perversa nur por perversa koro! sed por poeto ĝi estas versa trezoro ! ” li refutis.

Do, tiel ni refoje tralegis tiujn manuskriptojn kun delico, eĉ mi admiris, ke la anonima aŭtoro lerte kaj verve manipulis nian lingvon.

“Tia verko meritis premion de BK de UEA.” Guozhu lirlis.

Lutage ni vizitis librovendejon apud nia loĝejo en Kantono, en kiu ni trovis la libron kun ruĝa kovrilo, nomata **Mi Xi Tu Kao** (Erotic colour prints of the Ming period, with an essay on Chinese sexlife from the Han to the Ching dynasty, B.C.206 A.D.1644), nu, ties aŭtoro ja estas tiu holanda diplomato Robert H. Van Gulik, kiu havas la ĉinan nomon Gao Luopei. La libro estas elangligita de profesoro Yang en Sun Jatsen-a Universitato, kaj la eldonejo ĝuste estas la aŭtoritata Guangdong-a Popola Eldonejo.

“Jen, tia verko finfine aperas sub la sunlumo!” Guozhu gaje diris, eĉ ne forgesis ĵeti al mi sardonan trafon, “Sed vi, timema, timida, pudora olduleto!” Mi, tiam por esprimi mian kuraĝemon, tuj elpoŝe prenis monbiletojn de dudek juanojn RMB kaj aĉetis tiun volumon.

Dum alinokta babilado ni gustumis la libron de R. Gulik aŭ Gao Luopei kaj revis, kiel publikigos tiujn manuskriptojn. Ĉu ni kontribuos tiujn al la Ĉina Esperanto-Eldonejo? tamen ĉu ĝin niaj samideanoj de ĈEE povas akcepti? Eble... Do, kontribuos al la Kritikanto de Mine Yositaka? Kiam antaŭ miaj okuloj aperus la rigor-digna mieno de Mine, mi nur kapneis. Ĉu por Fonto de Bays? Eble ankaŭ ne estus konvena, ĉu la eminenta Juan Perez Regulo iam ankaŭ rifuzis eldonon de **Dekdu Noktoj de Satano** far Emby ? Kion fari ? tio ja obsedis nin, revema paro en la ĉambro.

Antaŭ semajnoj mi verkis recenzon por libro de Emby (Kalocsay) la **Dekdu Noktoj de Satano**, laŭ invito de Lena de Zilah, la fervora redaktorino de **La Gazeto**, tiam la lumo helis antaŭ mi: certe iu povus eldoni tiujn manuskriptojn, do, atendu !...

Sed en la sekvanta tago mi ankoraŭ sentis bedaŭron, ke al tiu eldonota libro mankas ilustraĵoj, eĉ al verko de R. Gulik en la ĉina versio. Mi denove grumblis pri tio al Guozhu.

“Tion mi kapablas solvi!” Guozhu delekte, aplombe ridetis, “Nu, mia kolego en oficejo ofte ŝatas frekventi libro-standojn sur stratoj, iufoje li aĉetis broŝuron kun ilustraĵoj, kiujn ĝuste R.Gulik enmetis en sian verkon. De li mi pruntis la broŝuron kaj foliumis...”

“Vi, parvenuo, kial vi ne pli frue informis min ?” mi koleretis, kaj nur kaĵolis lin plu: “Nu, kopiu tiujn al mi !”

“Nur, nur mi ne deziras kopii tiajn bildojn antaŭ publiko de kopibutiko, oni eble diros, ke tiu olduleto estas perversa...”

“Per versa trezoro vi fariĝos nababo!” mi riproĉis lin, ĉifoje ankaŭ mi eltiris de la buŝangulo sardonan rideton, “ Vi, ankaŭ timema, timida, pudora olduleto !”

“Do, mi petos alian kopii por vi!” li ĉiam sagace trovis solvon.

Guozhu foriris de Kantono antaŭ la Printempa Festo , reveninte al sia tenera nesto, kaj daŭrigas elĉinigi **la Strangaĵojn de Liaozhai** far Pu Songling. Tamen li, post semajnoj, sendis al mi la kopiaĵojn de tiuj ilustraĵoj.

Nun mi devas fini mian novelon pri anekdoto kaj pri tiuj ĉineskoj kaj ilustraĵoj. Kaj temas pri la resurekto de tiu ciklo kun la erotikaj bildoj, ke mi nur sentas min fiera, kvankam kun timema, timida, pudora skrupulo, eble tia versaĵo ankaŭ transfuzus al nia Esp-kulturo freŝan sangon el la orienta, ĉu Miyamoto en paradizo konsentus kun mi aŭ ne ? mi ne scias...

Nur mi devas atentigi vin, karaj legantoj, ke tiuj versaj erotikaĵoj absolute ne estas verkitaj de mia plumo !

Shi Chengtai

1995-01-09/2007-11

Kantono

n-ro 1

Invit' al ne Ĉinesko,
sed nur laŭ Ĉinesko...

Post muslin' ĉarma in';
koketas cica kulmin'!
sen timid',
verv-irit'
tiklas ardon
de la libid',
Spit',
spit',
spit'!

Sku-anim',
pudor-lim',
cedas al ĝuo-inklin'.
Nu, invit'
al ge-lit',
fol-amoru!
Ŝuldo-likvid';
kvit',
kvit',
kvit'!

—Laŭ ĉinesko *[Chaitoufeng](#)*



n-ro 2

Ĉe balustrad'

Ĉe balustrad' la kapo
pimpa brilis;
flirtas knabo,
balbute flatas dolĉe,
brustkareso,
pudorgapo.

Sur korolo l' jadskapo
ambrozion
frandas. Strabo
glitas en ruĝburĝonon;
nur silabo...

—Laŭ ĉinesko [*Yijianmei*](#)



Printempe

Printempe sub saliko
amorŝvebas.

En kaliko
li per jadpiŝto pistas.
Ŝi ebrias;
rosa liko.

Dum nubpluva muziko
petal-ovro,
hasta l' tigo.
Tremas aromtalia;
nektarfluo,
restas tiko...

—Laŭ ĉinesko [*Yijianmei*](#)




Tepidas

Tepidas tra spaliro.
Fandiĝo, fiŝ'
en akv-iro.
Jaspa krurpar' invitas
tigon; porĉ' en
centr' de lilo.

Anhelas ĝemdeliro,
ŝvitparfumo,
delicspiro.
Li ĉe l' orelo lirlas:
“Ĉu l' kaliko—
por mi tilo!”

—Laŭ ĉinesko [*Yijianmei*](#)



n-ro 5

Longas la tag'

Longas la tag'. Refuta
amorveko,
nudo tuta.
Tangas mamparo kruta,
jaspnimf' mova,
ard' saluta.

Duonas piŝto luda
por rigardo
avidgluta.
Kune balancaj branĉoj
dispetalas,
rosar' guta...

—Laŭ ĉinesko [*Yijianmei*](#)



n-ro 6

Troigo

“Troigo, Petolulo!”
flanke kuŝas;
puga brulo.
Per manoj cicotiklo
kaj krurlevo—
lipa spuro.

Ingas jadtiga turo
en ampolon.
Piedrulo.
Jaspa kalik’ inversas,
pasi-ondas,
ĝemrukulo...

—Laŭ ĉinesko [*Yijianmei*](#)



n-ro 7

Dumnokte

Dumnokta ge-brizo,
jadpišta remizo;
rosgutas flore,
stupora l' paliso.
Kiso,
kiso,
animo en gliso.

—Laŭ ĉinesko [*Rumengling*](#)




n-ro 8

Printemp-improvizo

Printemp-improvizo,
turmenta tighiso.
Insinuas en
buŝon jadpaliso.
Miso,
miso,
ankaŭ paradizo.

—Laŭ ĉinesko [*Rumengling*](#)



n-ro 9

Ĉe herboj

Ĉe herboj kuna kuŝo.

Subita puŝo
al jadpaliso
sur la brusto,
ovr-ferma guŝo.

Lipo-ĉe-lipa tuŝo,
jadtig' al pluŝo.
Kalikŝancelo
senlaca, kaj
strio da duŝo.

—Laŭ ĉinesko [*Zuihuayin*](#)




n-ro 10

Solec' en buduaro

Solec' en buduaro,
invit' al faro:
Rajd' sur jadtigo,
ŝveb-aplombe,
voluptdeklaro.

Gut' de perla ŝvitklaro,
ebria paro.
De rozkaliko
flu-susuro,
humilremparo.

—Laŭ ĉinesko [*Zuihuayin*](#)



n-ro 11

La hirundpara

La hirundpara voĉo
ŝajnas riproĉo:
Glitas or-tempo,
vi, stultuloj,
kiel pioĉo.

Vigla pasia kroĉo,
for vestoj, broĉo!
Brusto ĉe brusto,
koketsono,
jadpiŝt-enloĝo....

—Laŭ ĉinesko [*Zuihuayin*](#)



n-ro 12

Zefiro

Zefiro sur kuseno,
dorlota tremo.
Jaspkluzo ovro
per fingrmovo
al glitbobeno.

Ekzalta cicfesteno,
dolĉa ingveno,
nektaro suka,
ŝultren kruro,
—langvora sveno..

—Laŭ ĉinesko [Zuihuayin](#)



n-ro 13

Jadfluto

Jadfluto insolenta,
tujlev' momenta.
Hasta nudiĝo
al korol' de
ĉerizo tenta.

Ruĝa burĝon' ostenta,
kisad' frekventa;
en nesto vila
tenersuĉo,
ŝvebo kontenta....

—Laŭ ĉinesko [*Zuihuayin*](#)



n-ro 14

Post ban'

Post ban' miena brilo,
mampara koketo;
buŝe cicperla knedo,
anima gliso,
vat' al giĉeto.

Jadtiga tuŝ' je pordo,
soifa impeto,
spit' al jaspguŝa streto
ĉirkaŭ emano,
ĝu-kvodlibeto.

—Laŭ ĉinesko [Linjiangxian](#)



n-ro 15

Strebo

Strebo senintermita,
harara kareso,
hasta langa komplezo.
Gustumsufiĉo,
ŝpruĉa frenezo.

Jasp-pieda svingado,
ovra silo-mezo,
nektara roj-eksceso;
delekta pisto,
puŝad' sen ĉeso...

—Laŭ ĉinesko [Linjiangxian](#)



n-ro 16

Amor-elano

Amor-elano!
Ge' en bano;
en pasi-oceano,
kiel anasoj buntaj,
— ek! en dramo!

Erot-vulkano:
vanga flamo;
sieĝata jadjano,
murmure en vag-ino...
Fe-nirvano!

—Laŭ ĉinesko [*Langtaosha*](#)



n-ro 17

Enrob'

Enrob' leĝera,
temp' vespera,
bis! refojo prefera.
Nur apogo ĉe lito,
rest' butera.

Skapo fidela;
suko bera;
de pugo glit' libera.
Senlaca jaspkaliko,
vor' mistera...

—Laŭ ĉinesko [*Langtaosha*](#)



n-ro 18

Zefir'

Zefir', zefir',
lunhelo sur spalir'.
Jadtig' en patoso,
kuŝo ĉe fridroso;
soro,
soro,
aŭrora ignoro.

Rido, rido,
pasia avido;
reago-atako,
tenera bivako.
Kova,
kova,
eden-vivo nova!

—Laŭ ĉinesko [*Tiaoxiaoling*](#)



n-ro 19

Jadtigo

Jadtigo brula,
jasp-porĉ' hura.
Do, al sino natura!
En bosko de ĝardeno,
feaĵ' pura.

Altlevo krura,
apertura
jaspguŝo—roj' susura,
stringe ĉirkaŭ jadpiŝto,
sufiĉ' ĉura...

—Laŭ ĉinesko [*Langtaosha*](#)




n-ro 20

Pas' de nokt' volupta

Pas' de nokt' volupta,
tagiĝo abrupta.
Ros' en kaliko,
amfluo erupta.
Nupta, nupta,
neniam korupta!

—Laŭ ĉinesko [*Rumengling*](#)



*Je nubpluva vetero en Kantono, antaŭ kiam Guozhu revenos al sia tenera nesto, mi haste retajpas manuskriptojn de ĉi tiuj poemoj, kaj donacis ĝin, kiel l' disiĝan donacon, al ties instiganto, cenzuranto kaj komplico... s-ano Guozhu.

1994-12-09, Kantono



Ŝlosilo de Ĉinesko

1. Poemo, verkita laŭ skemo de ĉina fikforma poemo (ekz-e: ci-oj), estas nomata Ĉinesko.
2. En ĉina poezio, la skemoj de la fikformaj poemoj estas tiel multaj, ke la sumo eĉ superis 2000, tamen, el kiuj la plej ofte uzataj, nombris ĉ. 50.
por apreci aŭ versi ĉineskon, vi devas ekkoni unue tiujn skemojn.
3. Ĉiu ĉinesko havas sian propran nomon, kiu servas ĉefe (aŭ nur) por indiki la fikforman skemon, sed ne kiel titolo de la poemo.
Tial, diversaj poemoj, verkitaj laŭ la sama ĉinesko, devas havi tute saman fikformon, sed, samtempe, tute povas havi la plej diversaj malsamajn enhavojn.

4. Nomon de ĉinesko ni skribas per Hanlingva Fonetika Alfabeto (HFA). Ĝi aperas ofte en la (vic-)titolo de la poemo, sube de la poemtitolo, kiu ankaŭ tre ofte tute ne aperis.
 ekz-e: Laŭ ĉinesko Shiliuziling
 Uzo de laŭsence esp-igita nomo estas permesata, sed libera, ne deviga.
 Laŭ ĉinesko Dekses-silabo
 Do ni enmeti ĉitie en nia ŝlosilo ankaŭ la originalan nomon de ĉinesko en ĉinaj ideogramoj, por eventuala esp-igo laŭ bon-trovo de verkantoj.
5. Esperanta ĉinesko redonas jenajn form-karakterizaĵojn de la originala samnoma ĉina fiksforma poemo:
 (1)Nombro de strofo (j).
 (2)Nombro de versoj.
 (3)Nombro de silaboj en ĉiu verso.
 (4)Nombro de rimoj.
 (5)Rimaranĝo.
6. La skemon ni skribas jene:
 (1)Per ciferoj, kiuj indikas la nombron de silaboj en verso.
 (2)unu cifero por unu verso.
 (3)ciferoj por senrimaj versoj estas kune skribitaj.
 ekz-e: 43 signifas
 ne kiel “kvardek tri silaboj en unu verso”,
 sed kiel “du versoj senrimaj, el kiuj
 la unua verso enhavas 4 silabojn,
 la dua verso enhavas 3 silabojn.”
 (4)ciferoj supre/malsupre skribitaj indikas elekteblajn variantojn.
 ekz-e 4_3 la verso enhavas aŭ 4 aŭ 3 silabojn.

(5)post cifero de kunrima verso estas komo [,]. Tamen, ĉar la lasta verso de ĉiu strofo ĉiam estas kunrima, tial, ne estas tie superflua komo.

(6)per punktkomo [;], kiu indikas rimŝanĝiĝon.

(7)per /, kiu dividas forme malsamajn strofojn, dum la du samajn strofojn ni indikas per ()x2

(8)per asterisko[*], kiu indikas ripeto de la vorto(j).

(9)per du asteriskoj [**], kiu indikas palindromon.

(10)per literoj sub ciferoj, kiuj indikas rimaranĝon, rimŝanĝiĝon.

(11)per litero x por senrima verso.

(12)per majusklo, kiu indikas ripeto de la rimo.

ekz-e: signifas la skemo de shiliuziling: 1,7,35

la cifero 1 signifas ke la unua verso estas 1 silabo kunrima;

la dua verso estas 7 silaboj kunrima

la tria verso estas 3 silaboj senrima

la kvara verso estas 5 silaboj lastvice kunrima.

7. Aperis en la poemaro Ovra Burĝono resume 7 malsamaj ĉineskoj(vd §n-ro)

o CHAITOUFENG (§1):

skemo: (3,3,7;3,3,44,1,1*,1*)x2

ĉina fikforma poemo el du strofoj po ok versoj de 3,3,7,3,3,4,4,3 silaboj, laŭ rimaranĝo de a,a,a,b,b,x,x,b,b, (x-senrima) kaj la lasta verso estas tri samaj silaboj.


o LANGTAOSHA (§16,§17,§19):

skemo:(5,4,7,74)x2

ĉina fikforma poemo el du strofoj po kvin versoj de

- 5,4,7,7,4 silaboj, laŭ rimaranĝo de a,a,a,x,a.
(x-senrima)
- LINGJIANGXIAN (§14, §15):
skemo: (⁶7,6,7,⁴₅)x2
ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj de
7,6,7,5,5 silaboj, laŭ rimaranĝo de x,a,a,x,a.
(x-senrima)
 - RUMENGLING (§7, §8, §20):
skemo: 6,6,56,22,6
ĉina fiksforma poemo el strofo kun sep versoj de
6,6,5,6,2,2,6 silaboj, laŭ rimaranĝo de a,a,x,a,A,A,a.
(x-senrima)
 - TIAOXIAOLING (§18):
skemo: 2,2*,6;6,6;2**,2*,6
ĉina fiksforma poemo el ok versoj de 2,2,6,6,6,2,2,6
silaboj, laŭ rimaranĝo de a,A,a,b,b,c,C,c. La unuaj
2-silabaj versoj estas ripetaj vortoj (kaj ili ofte
skribiĝas kiel unu 4-silaba verso), same ankaŭ la
sesa kaj sepa versoj estas du ripetaj vortoj. Kaj la
unua vorto de la sesa verso devas esti el palindrome
ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvina verso,
ekz-e: roso-soro,vako-kova.
 - YIJIANMEI (§2, §3, §4, §5, §6):
skemo: (7,44,744)x2
ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ses versoj de
7,4,4,7,4,4 silaboj, laŭ rimaranĝo de a,x,a,x,x,a.
(x=senrima)
 - ZUIHUAYIN (§9, §10, §11, §12, §13):
skemo: (7,5,545)x2

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj de
7,5,5,4,5 silaboj, laŭ rimarango de a,a,x,x,a.
(x-senrima)



Guozhu 2003-06-22

en urbo Wuhano